


**Grupo Esperantista de Bilbao**
Barrencalle Barrena, 7-1ª deks.
48005-BILBAO (Hispanujo)

✍ *Redaktas:*
Jesús-Miguel García Iturrioz

**Kunven-tago:**
Vendredo (19:30-21:00 h.)
☎ 619.694.683 (Iciar)
☎ 658.709.087 (Jesús)
💻 esperantobi@gmail.com

(La E-Grupo de Bilbao estis fondita la 20an de majo de 1906)
TTT-ejo: https://sites.google.com/site/esperantobi/home
En Fejsbuko, serĉu "esperanto grupo bilbao"

**Jar-kotizoj**: Normala: **60** €. ● Familia: **70** €. ● Juna (ĝis 30 jaroj): **20** €.
**KUTXABANK-konto** (IBAN-kodo): **ES56-2095-0141-4122-1800-1550**

**JANUARO-MARTO 2024** **Nro. 138 (1/24)**

## ASAMBLEA GENERAL ORDINARIA

Por la presente, y según exigen sus estatutos, se convoca la asamblea general ordinaria del Grupo Esperantista de Bilbao para el próximo **viernes 12 de abril, a las 18,00 h.**, en su sede de Barrencalle Barrena, 7-1º dcha., con el siguiente

### Orden del día:

1. Lectura y aprobación, si procede, del acta de la asamblea general anterior.
2. Aprobación, si procede, del resumen de gastos e ingresos del año 2023.
3. Aprobación, si procede, del presupuesto para el año 2024.
4. Renovación de la Junta Directiva. Presentación de candidatos hasta el comienzo de la asamblea.
5. Posible organización de un congreso de Esperanto.
6. Informaciones varias por parte de la Junta Directiva, en especial, sobre el estado de las obras en el inmueble y sobre la marcha del proceso de usucapión.
7. Ruegos y preguntas.

Nota: **la hora límite para terminar la reunión será las 19:30 h.** ya que profesores y alumnos tienen que comenzar, a esa hora, la clase correspondiente del actual curso de Esperanto. **Atención a la hora de comienzo: 18:00 h**.

**LOKE**

## ĈIUJARA ĜENERALA KUNVENO.

Tiel kiel vi povas hispane legi supre, la **vendredon 12-an de aprilo, je la 18,00 h.**, oni okazigos la ĉiujaran ĉiesan kunvenon de la E-Grupo de Bilbao en ĝia sidejo de Barrencalle Barrena, 7-1ª dekstre laŭ la suba

**TAGORDO**:

1. Legado kaj aprobo, se indus, de la protokolo de la lasta kunveno.
2. Same pri la spezoj de la jaro 2023.
3. Same pri la buĝetpropono por la jaro 2024.
4. Nomumo de nova estraro. Prezentado de kandidatoj ĝis la komenco de la kunsido.
5. Ebleco organizi E-kongreson.
6. Informoj diversaj fare de la estraro, speciale pri la stato de la riparoj en la konstruaĵo kaj pri la demarŝoj por atingi la propraĵon de nia sidejo (uzukapo).
7. Proponoj kaj sugestoj.

Noto: **limhoro por fini la kunvenon: 19:30 h.**, ĉar gelernantoj kaj instruistoj devos ĉeesti la E-kurson. **Atentu pri la komencohoro: 18:00 h**.

## ZAMENHOFA NASKIĜDATREVENO.




Kiel anoncite, denove ni kunmemoris la Zamenhofan naskiĝdatrevenon.

Tio okazis la vendredon 15an de decembro kaj entute ĝin partoprenis 14 homoj en ege amika etoso.

La ĉeestantoj ludis demandokonkurson, organizita de David kaj Pako, kies gajnintoj ricevis belajn E-donacojn.

Post tio, nia entuziasma amikino Susana regalis nin per ludado de piano, kiun ŝi finigis per La Espero, ĥore kantata de ĉiuj.

Kaj, kiel tradicie, la kunveno finiĝis per komuna vespermanĝo kaj afabla interparolado.

# LOKE

## KRISTNASKA LOTERIO.


Esperanto-Grupo
ESPERANTO
www.esperanto.net
Barrencalle Barrena, 7 - 1.º • Tfno. 658 70 90 87
48005 BILBAO
Nacia Loterio N.º 72.944
La posedanto de tiu ĉi kvitanco partoprenas, per kvar (4,00) eŭroj, la numeron kies lotado okazos en Madrido la 22-an de Decembro 2023.
GRUPO ESPERANTISTA
Barrencalle Barrena 7 1.º
48005 BILBAO
0001
4,00 eŭroj
(MON-DONACO: + 1,00 €
En caso de premio, este número estará sometido a los gravámenes que establece la legislación tributaria vigente.
Senvalora post 3 monatoj. Caduca a los 3 meses. 3 hilabeteren ondoren, baliorik gabea
Imprenta MENA - Portugalete

Unu jaron plian ni devas ripeti ke favora sorto ne trafis nin en la nacia lotado de Kristnasko.

Krome ni ne kapablis vendi ĉiujn kvitancojn, do ni devis resendi kelkajn biletojn al loterivendejo. Ve!

Spite de ĉio ĉi ni dankas ilian laboron al ĉiuj, kiuj helpis en la disvendado, tre speciale al tiuj geesperantistoj, kiuj loĝante ekster nia urbo, aĉetis niajn E-kvitancojn pere de interreto .... Ĝis la venonta jaro.

## NOVA E-KURSO.




La venontan 19an de aprilo ekos nova baza E-kurso.

Ĝi estos gvidata de **David Redondo kaj Mila Mezo**.

La lecionoj disvolviĝos marde kaj vendrede, de la 19:30 h. ĝis la 20:30 h. kaj oni uzos la lernolibron "Rekta metodo".

David instruos la mardojn kaj Mila la venfredojn.

Ĉiuj estas bonvenaj.

Memoru: **La 19an de aprilo, de la 19:30 ĝis la 21:00 h.**

## FORPASIS.




La 2an de oktobro forpasis en Valdestillas (Valladolid) nia amiko **Gabriel Ruiz Mediavilla**.

Iam li estis aktiva esperantisto kaj membro de la estraro de nia asocio.

Malgraŭ ke dum la lastaj jaroj li ne multe ĉeestis nian sidejon, li kutimis viziti nin almenau du fojojn dum la jaro: por partopreni la ĝeneralan kunvenon kaj por aĉeti loterion.

Ke li pace ripozu.

LOKE

## NOVA FRONTOPAĜO.

Eble vi rimarkis, ke nia frontopaĝo ŝanĝiĝis. La ideo kaj la skizo estas kreaĵoj de nia samGrupano **Iñaki Vélez**. Ni esperas, ke ĝi plaĉu al vi.

## NIA SOCIARO DUM 2023.

Dum 2023, al la E-Grupo de Bilbao, aliĝis 6 homoj:

- BRANDA, María Marta
- PESCA PARRA, Akane Carolina
- GÓMEZ ORRUÑO, Vanessa
- DÍEZ SÁIZ DE LA MAZA, Yolanda
- BARRIO PÉREZ, Carlos
- WERNER, Ulrike

Eksis:

RUIZ MEDIAVILLA, Gabriel (Forpasis)

Do, je la fino de 2023, nia E-rondo nombris 58 membrojn.

## IOM DA HISTORIO.

La jaron 1887an oni celebris la 100-jariĝon de Esperanto per diversaj kunvenoj kaj aranĝoj. Inter ili, Universala Kongreso en Varsovio kun oficiale 5.946 partoprenantoj, la plej alta kvanto neniam atingita ĝis nun.



En Hispanio ankaŭ ni havis jubilean kongreson. Ĝi okazis en Madrido, kun preskaŭ 300 partoprenantoj kaj kun alia rekordo: neniam tiom da bilbaoanoj partoprenis hispanan kongreson. Sur la apuda foto oni sukcesis kunigi ilin. Kelkaj jam forpasis sed restas en nia memoro kiel neforgeseblaj homoj. De maldekstre dekstren, ili estas:

Plácida Sotillo, Teodoro Ibáñez, Daniel Sampedro, Juan Liceranzu, Iñaki Vélez, Jesús-Miguel García kaj Luis de Otaola. Mankas sur la foto Julio Juanes, Tomás Apraiz kaj Eduardo Larrouy.

**HEF**

## SCIENCA KALENDARO 2024.




CSIC (Supera Konsilio por Scienca Esplorado de Hispanio) jam prezentis la eldonon de 2024 de la Lerneja Scienca Kalendaro, kiu denove havas version en Esperanto. Bedaŭrinde ĉijare ne estas pdf-versio, sed vi povas trovi aliajn formatojn en:
https://eventociencia.es/calendario-cientifico-escolar/
https://www.csic.es/es/actualidad-del-csic/descubre-las-nuevas-efemerides-del-calendario-cientifico-escolar-2024
https://digital.csic.es/handle/10261/341368
https://twitter.com/SciKalendaro

La kalendaro estas alirebla en jenaj lingvoj: hispana, astura, kataluna, valencia, galega, vaska-euskera, angla, portugala, araba, farsia kaj Esperanta.

## JAM PRETAS LA NOVA RETEJO DE HEF.




Ni devis ŝanĝi al Wordpress por provi solvi certajn problemojn pri sekureco, kiujn HEF suferadis de antaŭ iom da tempo. Espereble, ĉi tiu ŝanĝo plibonigos la situacion.

La kunlabora skipo jam finis sian laboron kaj petis la aprobon de la estraro por publikigi la novan retejon. Sendepende de tio, eblus plu poluri ĝin poste se oni trovas tion necesa.

La estraro trovis ĉion en ordo, sekve do, ĝi konsentis plublikigon de la nova retejo.

Jen ĝia adreso: https://heftesto.esperanto.es/

## LABOROJ EN LA HEF-SIDEJO.

Meze de marto komenciĝis riparoj en la sidejo de Hispana Esperanto-Federacio en Madrido, kiun kunhavas la Madrida E-Liceo.

Oni farbos la murojn, oni anstataŭos fenestrojn kaj pordon, kaj kelkajn aliajn malgrandajn laborojn. Tial, povas okazi ke iuj el la kutimaj aktivadoj povas esti malhelpataj.

Laŭ decido de la ĝenerala kunveno de MEL, kiu okazis en la sidejo la 19an de februaro, la Liceo prenos sur sin la kosto de la ŝanĝo de la enirpordo.

*("Nia Voĉo", organo de Madrida E-Liceo. Marto 2024)*

**HEF**

## HISPANAJ KONGRESOJ. TRE STRANGA KOINCIDO.

Jen tre stranga hazarda koincido. Post okazigo de hispana kongreso en Valencio, preskaŭ ĉiam okazis kongreso en Bilbao. Nur unu fojon ne estis tiel, ĉar la kongreso en Bilbao prokrastiĝis unu jaron. Sed, eĉ tiam, inter Valencio kaj Bilbao enŝoviĝis la urbo hispana, kies nomo plej similas al Valencio: Palencio.

| | | | |
|---|---|---|---|
| 1923 VALENCIA | ---> | 1924 BILBAO | |
| 1952 VALENCIA | ---> | 1953 BILBAO | |
| 1964 VALENCIA | ---> | 1966 BILBAO | (1965 PALENCIA – Preskaŭ "Valencia") |
| 1988 VALENCIA | ---> | 1989 BILBAO | |
| 2003 VALENCIA | ---> | 2004 BILBAO | |

## HISPANA KANDIDATAĴO AL FESTIVALO EUROVISION 2024 EN ESPERANTO.




Vi povas trovi la videon en https://youtu.be/TaaGH0i8E64.

Malgraŭ la polemiko, kiu tiu kanzono vekis en hispanio pro siaj teksto kaj titolo, la Esperanta versio estas ege profesia kaj altkvalita.

Ni memoru, ke en la originala hispana versio la kanzono titoliĝas "zorra" ("vulpino"), kio en la hispana, unu el ĝiaj signifoj estas "putino".

Ĝuste tia estas la titolo en la Esperanta versio: "Fiputino".

## FRAMASONISMO KAJ ESPERANTO.



La 26an de februaro, en la ĵurnalo "El Obrero" ("La laboristo") aperis artikolo de la historiisto Eduardo Montagut pri la rilatoj inter framasonismo kaj Esperanto.

Legebla en https://elobrero.es/historalia/130579-masoneria-y-esperanto.html

## HISPANA KONGRESO EN CHESTE (ĈESTE) (VALENCIO).

Ĝi okazos de la 5a ĝis la 8a de septembro en Cheste (Ĉeste), 28 km. de la granda urbo Valencio kaj 23 km. de la valencia flughaveno. La programon ankoraŭ oni prilaboras. Baldaŭ estos pli da novaĵoj pri la organizado.

# TRA LA MONDO …

## PAROLADO DE UEA ĈE UNESKO.





Ĉiun duan jaron, UNESKO kunvokas dusemajnan Ĝeneralan Konferencon en novembro (ĉi-jare: 7 – 22 novembro 2023), kaj dum la unua semajno dudeko da horoj estas dediĉitaj al la “debato pri ĝenerala politiko”: antaŭ la pleno rajtas paroli po ses minutojn ĉiuj membroŝtatoj kaj po tri minutojn la Ne-Registaraj Organizoj, kiuj petas tion kaj estas akceptitaj. Praktike 84% el la ŝtatoj alparolis, kaj ĉirkaŭ 8% el la organizojn.

Ĉi-jare, Universala Esperanto-Asocio profitis la okazon por alparoli la sabaton, 11an de novembro, matene. La franclingvan tekston legis **François Lo Jacomo**, reprezentanto ĉe Unesko kaj estrarano de UEA. Kiel ĉiuj aliaj alparoloj, ĝi estas spektebla per la retejo de Unesko.

Danke al la laboro de nia argentina amiko **Pablo León**, la paroladon eblas sekvi per hispanaj subtekstoj.

*(“La Bitbulteno” de HEF. Nro. 92. Decembro 2023)*

## MORTO DE WIM JANSEN.



La pasintan 2an de februaro de 2024 mortis en Nederlando, lia naskiĝlando, Win Jansen. Li estis aerospaca inĝeniero, sed ankaŭ filologo, kiu okupiĝis pri diversaj lingvoj, inter ili la vaska/eŭska kaj Esperanto.

Inter aliaj verkoj, li estis aŭtoro de:

*Basque-English, English-Basque, Dictionary and Phrasebook*, (1998)

*Zuiverheid en zuivering in het Baskisch* in *Taaltrots. Purisme in een veertigtal talen. (1999)*

*Beginner's Basque (2002)*

*Baskisch und Esperanto: ein Strukturvergleich* en *Esperanto und andere Sprachen (2009).*

*Ni lernu la eŭskan. Gramatiko kaj ekzercoj, (2020), kune kun* ***Aitor Arana****.*


## 350 000 ARTIKOLOJ EN LA ESPERANTA VIKIPEDIO.




La Esperanta Vikipedio en mardo atingis la kvanton de 350.000 artikoloj. Ĝi nun estas sur la 36-a loko el 326 en la listo de diverslingvaj Vikipedioj. La kvanto de artikoloj estas pli granda ol ekzemple en la dana (300.000) kaj iom malpli ol en la eŭska (430.000), sed multaj esperantistoj trovas la kvaliton nekontentiga.

*(“Libera Folio”. En Interreto. 20/02/2024)*

## Politika movado de Varoufakis uzas Esperanton.



Eŭropon regas oligarkoj. Tion asertas politika movado fondita de Yanis Varoufakis, iama financministro de Grekio. La movado, kiu aktive uzas Esperanton, interalie kampanjas por liberigo de sia membro Julian Assange, sporta bojkoto de Israelo kaj ”demokratia revolucio”.

*(“Libera Folio”. En Interreto. 13/02/2024)*

## Ĉu Esperanto aŭskulteblos en la Eŭrovizia Kantokonkurso 2024?




Ĉu Esperanto aŭskulteblos en la Eŭrovizia Kantokonkurso 2024?

En la antaŭkonkursa aranĝo organizita en Sanmarino por elekto de la kanto, kiu reprezentos tiun landon, unu el la kanto estas esperantlingva:

Aŭskultu ĝin:

https://youtu.be/XeIxFLbQQsM?si=BYE-zGZbioh1Gwbv&t=4850

*(MZ. 28/02/2024)*

## E-POŜTMARKO.




Okaze de la eŭropa kongreso okazonta en la franca urbo Strasburgo, diversaj naciaj asocioj, inter ili HEF, eldonigis poŝtmarkon.

HEF distribuis ĝin inter la hispanaj grupoj, kiuj membriĝas en Ĝi po 6 p.m. al ĉiu grupo.

La p.m. validas por nacia normala afranko.

La kongreso disvolviĝos de la 8a ĝis la 12a de majo. Se vi interesiĝas pri la p.m. aŭ pri veturado al Strasburgo, demandu ĉe nia E-Grupo.

## VENONTAJ E-ARANĜOJ.

- Eŭropa E-kongreso. Strasburgo. 8-12 majo 2024.
- UK. Aruŝo (Tanzanio). 3-10 aŭgusto 2024.
- SAT-kongreso. Oporto. 5-11 aŭgusto 2024.
- 2024 IJK. Ŝventoji (Litovio). 18-25 aŭgusto.
- 82a Hispana kongreso. Cheste (Valencio). 5-8 Septembro 2024.